La « Fenomeno Esperanto » en la Forumo de la Urbodomo de Laŭzano

Parolado de Sarah kaj Sylvain Meigniez

dum la malfermo de la ekspozicio, 27-a de oktobro 2015

Bonan vesperon al ĉiuj!

Nome de la **Laŭzana Esperanto-Societo** ni deziras kore bonvenigi vin en la *Forumo de la Urbodomo*. Ni tre ĝojas esti ĉi tie hodiaŭ kaj dum la du venontaj semajnoj.

Unue ni volas speciale saluti kelkajn rimarkindulojn kaj danki ilin por la ĉeesto:

- *Sinjoro **Oscar Tosato**, urbestrarano de Laŭzano*;

- *Sinjoro **Stefano Keller**, estrarano de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj ties ĉefreprezentanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo*;

- *Sinjorino **Nicole Piron**, edzino de Claude Piron, famaj esperantistoj.*

Ni tre dankas la Estraron de Laŭzano por la disponigo de tiu ĉi ekspoziciejo kaj de ĝia materialo, … samkiel por la trinkaĵoj de la inaŭguro!

Kio estas Esperanto? Esperanto estas lingvo. Lingvo justa, vivanta kaj tre facile lernebla. Kaj kion faras la homoj pere de lingvo? Ili parolas, kantas, skribas, verkas, ŝercas, interkomunikas, interkompreniĝas… Nia ekspozicio celas vidigi la nekredeblan diversecon de la esperanta movado.

Konkrete la ekspozicio proponas al ĉiuj promeni laŭ lernvojeto malkovrante la lingvon, ĝian historion, disvastiĝon, ĝian uzeblon dum vojaĝoj, kaj tiel plu. Certe ĉiu trovos ion interesan! Se vi tute ne ŝatas legi, ni invitas vin ekkoni Esperanton alimaniere, dank'al ludeca lernmetodo. Ĉiutage deĵoros esperanto-parolantoj, kiuj volonte respondos al viaj demandoj kaj rimarkoj. Do ne timu alparoli ilin!

Nun ni deziras al vi bonan vesperon.
Ĝuu la ekspozicion!

http://www.cdeli.org/fenomeno-esperanto/